

Esperantujo kiel en niaj reklamiloj Internaciisma Renkontiĝo kun „interkultura edukado“

Tro mallonge, estus mia unua reago, kaj tio signifas, ke mia edzino Hedwig kaj mi ravite revenis de la ĉarma haven-urbo Canet de Mar en Katalunujo. Tie de la 29a de junio ĝis la 1a de julio okazis la Internaciisma Renkontiĝo de Katalunaj Esperanto-Asocio kaj -Junularo, al kies organiza teamo sub gvido de Ferriol Macip i Bonet mi tre dankas.

Ĉi-jare la temo estis „interkultura edukado“, ĉar same nomiĝas la Grundtvig-projekto, en kiu ĝis 2013 kunlaboras la Esperanto-Asocioj de Francujo, Svisujo, Katalunujo kaj Germanujo. Pro tio la aranĝo estis ankaŭ sufiĉe internacia, kaj senprobleme



La Esperantista grupo dancante en la urbofesta procesio. Dekstre Ferriol Macip i Bonet. Foto: Hedwig Fischer

partoprenis tri generacioj kune.

La programo estis konvena miksaĵo de seriozaj kaj distraj eroj. Al la temo de la Grundtvig-projekto apartenis tri prelegoj (kun diskutoj), nome:

– Akceptado de enmigrintoj en la Katalunaj lernejoj, far Rubén Fernández

– Kiel lingve trakti la du seksojn? (de mi mem), kaj

– Agendo de la lando: 15monata kampanjo „por iri de la indigno kaj la popularaj enketoj pri la sendependeco al la definitiva ago por konstrui senperantoj la landon de la mondo, kiun ni volas“. Jen ni renkontis indikon, kiel energie la Katalunoj provas savi sian kulturen identecon, preferante federalismajn strukturojn anstataŭ politika centralismo.

La organizantoj elektis la semajnfinojn tiel, ke ĝi okazis dum la urba festo de Sanktaj Petro kaj Paŭlo. La Esperanto-grupo vespere simple aliĝis al la festa procesio kaj kun-dancis kaj -festis. Entute la amika etoso de tiu renkontiĝo kaj la senproblema ide-interŝanĝo eĉ pri komplikaj temoj kondukis al la sperto, ke foje vere Esperantujo estas tute tia, kia en niaj propagandiloj.

Rudolf Fischer



Atenta aŭskultantaro dum la prelego „Agendo de la lando“
Foto: Hedwig Fischer